

# HES

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


REDAKTORINO:  
F-INO CARMEN NAVARRO

**Nro. 74 - 1972**

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.<sup>a</sup>  
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5




LA VIRINO DEVAS KUNLABORI, EN LA KONSTRUADO DE  
PLI BONA MONDO



E N H A V C

Paĝo

Aŭtuno .....	1
Korespondado .....	1-3-5
La ĝojo de la espero..	2
Poezio .....	3
Kie ni staras?.....	4-5
Artikolo .....	6-7
Sufloro k.t.p.....	8
Esperanta kulturo.....	9
Kotizoj .....	10
Notoj .....	10-11
La eterna trajno.....	12




= = = = =

A U T U N O

En la bunta velka folio  
somera feliĉo.

En la griza pluva gut  
larmo.

En la malseka nigra arbatrunko  
funebro.



ANNE KIPPER(ESTONIO)

DEZIRAS KORESPONDI . . . . .

MARE MIUS (Si estas instruistino kaj ankaŭ  
leane 15 interesas pri bildkartoj.)  
RAKVERE-ESTONIO-SOVETUNIO

22 jara knabo deziras korespondi kun geesperantis  
toj en la tuta mondo. Lia adreso:  
EMILIO LOPEZ PRADANA  
St. Alcázar de Toledo, 39, 1º  
CULLERA-(VALENCIA)(Hispanio)

= ! = ! = ! = ! = ! = ! = ! = ! = ! = !



# LA ĜOJO DE LA ESPERO

Cu vi konas la frazon : "La feliĉon konsistas el havi ion por fari, ion por ami, ion por esperi". La signifo estas klara, kaj ni multfoje rememoras ĝin.

ION POR FARI: Ne lasu ni ke la senokupeco, la malagemo invadu nian vivon. Ĉiutage ni laboru kio podante ŝati nian laboron kaj serĉante la pozitivan flankon de ĝi.

ION POR AMI: Amo al niaj gepatroj, al niaj geamikoj, al niaj gefiloj, amo kiu dolĉigas ĉiun momenton el nia vivo, amo kiu fortigas nin en la malfacilaĵoj kaj kiu impulsas nin al la supereco, amo kiu ankaŭ implicas oferon, ĉar la plej granda pruvo de amo estas sin doni al tiuj kiuj amas nin.

ION POR ESPERI: Kaj kiel oni povas vivi sen unu celo, unu espero? La homo bezonas enlitiĝi ĉiunokte dezirante la alvenon de la venonta tago ĉar en ĝi li realiĝos novan fazon el la fiksita celo. En sia vojo li trovos barojn, malfacilaĵojn, tio estas neevitebla, tamen la homo daŭrigos la lukton por atingi sian celon.

Jen estas la feliĉo. En tiu pura lukto, en tiu ĉiutaga laboro por realigi propran esperon, por kontribui al la bonstato de tiuj kiuj ĉirkaŭas lin kaj kiel konsekvenco al de la Homaro. Jen estas la ĝojo, la aŭtentika amo al la aliaj, la nura ebla feliĉo en nia mondo. Kaj ke nia laboro estu reala, efektiva kaj ne nur promesoj de tio kion ni "povus" fari. La troigo de vortoj kondukas nenien. Paroli estas facile por "kelkaj". Tio kio ja ne estas tiel simpla estas agi laŭ tiuj belaj frazoj.

ION POR FARI: Agon, laboron.

ION POR AMI: Amon, oferon por profito de la aliaj.

ION POR ESPERI: Celojn, esperojn, iluziojn por ke nia vivo havu sencen. Ke ĉiu homo havu sian esperon, kaj ke ĉiuj ni ĝuos de la ĝojo de la espero.

# KIEL LA VER' FARIGAS

Lirik' mirinda de l' momento!

L' anim' atendas emocion,

La strangan, nekaptetblan "ion",

Voĉtonon kaj la stilo-senton.



Poste l' unua vorto sonas,

Penetras kiel bril' la penson,

Serĉas kaj celas ĝustan sencon,


Daŭre paroli min ordonas.

Kaj tiam -- uragan', furio!

Ordon' tirana de l' neceso.

...Silent'...kliniĝas la tempio,

Ekbrilas larmoj nun... sen ĉeso.



(trad. Jadwiga Rydygier).

Kunlaboraĵo sendita de VITOLD SYMONOVIĈel POLLANDO

=====



K O R E S P O N D A D O .....

19 jara oficistino deziras korespondi kun gejunuloj de la tuta mondo por praktiki Esperanton.

M<sup>a</sup> LOURDES BARBERO

St. Alcázar de Toledo, 39, 3<sup>o</sup> P.18

CULLERA-(VALENCIA)(Hispanio)





K I E

S T A R A S ?

NI




Dum la I-a Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer (1905) oni difinis tre klare, laŭ propono de nia majstro D-ro. Zamenhof, kaj per la Deklaracio pri la esenco de la Esperantismo, la vojon kiun devis sekvi ĉiu vera esperantisto. De tiam la esperantistaro, devigata pro tiu oficiala akcepto de la principoj entenataj en tiu Deklaracio, iris kaj faris laŭ tiuj historiaj vortoj.

La laboroj pli malpli sukcese daŭrigis ĝis nun, sed estis necesaj 64 jaroj por ke la esperantista junularo havu ankaŭ oficialan gvidlinion por sia aktivado, kaj tiu estis la Deklaracio de Tyresö (1969). Tiun ĉi Deklaracion rememorigas al ni la nuna prezidanto de T.E.J.O. D-ro. Renato Corsetti, en la decembra "Esperanto".

Ambaŭ deklaracioj havas la saman celon, la disvastigado de la internacia lingvo Esperanto en la mondo. ankaŭ ambaŭ estas adaptitaj al la tempo de sia naskiĝo. Kiel ekzemplo mi citos parton de la 2<sup>a</sup> paragrafo de la Bulonja Deklaracio: "La celo povas esti atingita nur per laborado praktika". Dume la Deklaracio de Tyresö difinas tiel: "La estonta agado de TEJO inkluzivas lanĉon de aktivecoj, kiuj celos pli vastigi la dimension de la individuo en la socia kaj teknologia evoluo. Tiuj aktivecoj baziĝos sur la specialaj trajtoj de T.E.J.O., kiel organizo laboranta por forigo de ĉia misuzo de lingvoj por ekonomia, kultura aŭ politika subpremado" (4b).

Do ni povas diri ke la unua solvis la problemon per laborado praktika. Sed la junularo ne forgesis la sociajn nuntempajn tendencojn kaj en la aktivecoj rememoras la plej oftajn subpremadojn.

Tamen en la nunaj kondiĉoj estas interese






konscii la rolon de la esperantista junularo en la kadro de la aktualaj ŝanĝoj en la tutmonda socio, sed pli grave en la civilizataj landoj. Kaj tiu konscio, laŭ vortoj de D-ro. Corsetti, estas " ke la batalo por Esperanto estas batalo por la homa digno ".

Nu, se ĉie la junularo ribelas favore por diversaj problemoj, ĉu ekonomiaj, ĉu kulturaj, ĉu politikaj, ni devas agi same por elmontri la valoron kaj taŭgecon de nia Esperanto . Kaj, surbaze de la Deklaracio de Tyresö, TEJO organizis kaj organizas konferencojn kaj seminariojn kun interesaj temoj pri tiuj problemoj, jen kelkaj titoloj: Lingvo kaj kulturo, Lingvo kaj politiko, Homo kaj tekniko, Kien iras la mondo ?, kaj por la venonta IJK en Toruń elektis : "La junularo kaj la Tria Mondo".

Sed kion ni agas ? .





JUAN AZCUENAGA

F-ino. ELIETE CARVALHO DE SOUZA  
 Q.E. 20 çoj.P. casa 125  
 GUARA-BRASILIA D.F.  
BRASIL



17 jara studentino el Brazilio deziras korespon di kun hispanaj geesperantistoj. Ŝiaj hobiaj estas sporto, muziko, kaj legado kaj interŝangi bildkartojn, poŝtmakojn kaj poŝtkartojn.

= / = / = / = / = / = / =




# PROBLEMO

Si estis belega, ŝi radiid ĉarmon kaj feliĉon. La geĉeestantoj envieme rigardis ŝin, la virinoj ŝin rigardis kun envio pro la fakto ke ŝi jam kaptis edzon kaj la viroj ŝin admiris tial ke ŝi estas bela, belega.


Jes, ŝi estis mia edzino kaj ni troviĝis en la bankedo per kiu ni celebris nian geedziĝan feston. Mi estis feliĉa kaj kontenta flanke de mia kara edzino.

Kelkaj el miaj preferataj amikoj akompanis min en la -adiaŭo- kiel ili diris kvazaŭ mi jam malaperus por ĉiam. En mia opinio ili multe eraris. Kiam mi rigardis miajn amikojn, kiuj bone ĝuis mian geedziĝan feston, al mia menso venis multaj kaj agrablaj memoraĵoj de travivaĵoj kiujn ni kune ĝuis. Tiuj noktoj de amuzo kaj diboĉado ne plu revenos, ĉu la vivo estos por mi tiel bela kiel estis antaŭe? ĉu mi estos en mia nova vivo tiel feliĉa kiel antaŭe?. Subite mi hontis pro ĉi tiu penso kaj eĉ momenta forgeso de mia edzineto. Mi, kiu estis enviata de viroj kaj virinoj. Si ĉion meritas kaj mi devas feliĉigi ŝin. Mi devas rigardi la estontecon kun plena espero. Mi amas ŝin, ŝi reciprokas, do ni vivos en granda amo. Ĉu mi rajtas nur memori la pasintecon kaj dubi pri la estonteco?.

Nur antaŭ tri semajnoj mi kaj miaj amikoj celebris mian adiaŭan feston kiel fraŭlo, ili adiaŭis min kiel homon liberan, sed, kial? Ĉu vere mi perdis la liberon? Mi bone memoras ke unu el miaj amikoj levis la kopalon kaj tostis, li diris la jenon: Ni trinku, en la lasta nokto kaj lasta festo en kiu akompanas nin nia kara amiko ĉar li ne plu estos libera, li falis en la reton de la amo, ekde nun al li ne estos permesata rigardi aliajn virinojn kaj multe malpli ilin amindumi, niaj kunvivitaj homoj en la plej granda kamaradeco restos por ni kiel eterna pruvo de nia amikeco. Malgraŭ ke ni bedaŭras la decidon de nia amiko, ni al vi deziras grandan feliĉon en akompano de via bela edzino, en







via nova vivo. Ni trinku kaj adiaŭ amiko !.

La paroladon de mia amiko mi neniel povis forgesi kaj ĝi tre pensigis min, ĉu mi eraris kiam mi elektis la nunan staton?. En ĉi tiu bilanco, inter la pasinteco kaj estonteco mi volis analizi precipe la forpasitan tempon. Ne, mi ne povos forgesi la feliĉajn tagojn kiujn mi vivis en plena libero, kaŭ price kaj senzorge en akompano de mia amikaro. Rekonpence al tiu pasinta vivo jen la estonto, kiu donos al mi la fidelan amon de mia amata edzino, ĉe ŝia flanko mi ne dubas, mi elektis la bonan vojon. Miaj amikoj ne plu rajtos diri ke mi perdis la liberon; male, en reciproka amado, mia edzino kaj mi atingos tiel grandan stadion da feliĉo ke la estonteco multe pli brilos ol la sopirata pasinteco, ĉar, ĉu la amo ne estas sinonimo de libero ?.

La festo finiĝis kaj miaj amikoj adiaŭis min, ili manfrapetis mian dorson tre kareseme, sed tiuj frapetojn mi bone interpretis ili signifis : amiko estu feliĉa, mi kompatas vin, vi kiu estis tiel sendependa.... Amikinoj de mia edzino adiaŭis ŝin kaj min. Antaŭ miaj okuloj ŝajnis kvazaŭ troviĝis multaj el miaj amikinoj kiujn mi konis dum mia fraŭla vivo, sed ne, ĝi ne estas realo, ĉar nur post kelkaj horoj mi kaj mia edzino restis solaj por ĉiam. Jen mia destino.

**A T E N T U ! !**

⤵ &

Jen la temo por konkursi:


Vi kiu legis la ĉi-supran artikolon, kion vi opinias, ĉu mi estis vere enamiĝinta de mia edzino?. Al la plej taŭga respondo oni premios kun la libro "Sep fratoj" de la finna literaturo.

Sendu la respondojn al la adreso de H.E.J.S.  
St.Barrenacelle Barrena,7  
BILBAO- 5

( LUIS SERRANO PEREZ )

( SABADELL )

NE SPULTU



Vere estas triste, se vi ne kapablas ĝoji sen al-  
koholo.  
Vere estas mizere, se via kuraĝo dependas de bran-  
do.  
Ne plaĉigas vi, babilanta "heroo" kaj vane vi naŝ-  
kas malfortecon per bonego.  
Vane vi fuĝas de vi mem al alkoholaj vaporoj, kaj  
kial ?  
Per alie vi naskiĝis!. Ne timu, fidu, leviĝu, vivu!.

G. ILA CI

& & & & & & & & & & & & & & & & & &

SUFLORO

Plej alta grado de homa ekkono efikas en saĝeco,  
kiu ekkonas kaj instalas ordon.

B. KAFKA

Multaj homoj anstataŭ vere vivi teatras por  
aliaj.  
Pli da ideoj kaptas, ol kapablas en kapo ordigi.  
SKLAW

Vera paco, en kiu ĉie disfloras estas frukto de  
vero, justo, libero kaj amo.  
Ĉeteraĵoj estas nur elĉerpantaj militpaŭzoj.

MIX

\$ \$

SUPREN LA KOROJ

Progreso signifas paŝo al celo. Kiel do povas  
pri progreso paroli tiu, kiu anstataŭ celon konas  
nur aldone elpensitajn imitaĵojn ?

SKLAW

Savi la mondon povas nur sanktuloj. aliaj vivas  
en sonĝoj.

ILA CI

Kunlaboro:

BOHUSLAV GRIM (ĈEKOSLOVAKIO)



Multaj esperantistoj kiam parolas pri Esperanto kutimas emfazi ĝian simplecon kaj ĝian facilecon. Tio okazas pro ilia entuziasmo kaj fervoro. Sendube ili agas senmalice, sed la menciita lingva trograndigo estas nekaprobinda nek konsilinda se oni emprofundigas iomete la aferon; ĉar estas evidente ke altiritaj la lernontoj per tia agrabla slogano, ili spertos frue aŭ malfrue grandan kaj neforgeseblan elreviĝon.


Se ni estas saĝaj kaj honestaj, ni tion evitos. Ni klopodu ĉiam komprenigi ilin ke Esperanto estas eksterordinare pli facila, eĉ tridekfoje pli facila ol kia ajn idiomo parolata en la mondo, se oni bone komparas la jenajn faktorojn: tempo, mono kaj fortostreĉoj.

Nu: ĉar Esperanto estas lingvo, oni devas studi ĝin atente kaj serioze, speciale tiu kiu deziros gvidi kursojn. Kompreneble, lerni gramatikon estas malagrablaĵo, sed rememorigu proverbon:

"LERNADO HAVAS MALDOĈAN RADIKON SED BONAN

EFIKON" .

(daŭrigota)



JAIME ARAGAY PUJOLS

PASKA KULTURA SEMAJNO 1972 de U.F.E. ORGANIZITA  
DE J.E.F.O.

KIE loĝi:Kastelo de Grésillon,49- Saugé (Francio)

KIAM ek de lundo la 3<sup>a</sup> de aprilo ĝis la 9<sup>a</sup> aprilo

KIOM pagi: la prezoj kiuj sekvos, estas en francaj frankoj kaj entenas ĉion (manĝado, loĝado, ekskurso ktp.)

Eksterlandanoj	.....	150 ff.
Junaj Francoj	.....	160 ff.
Francoj (pli ol 25 j.).....		170 ff.

Se vi volas familian ĉambron:Kotizo + 24 ff.

Se vi volas apartan ĉambron :Kotizo + 48 ff.

Ciu okaze vi ricevos bonegan liton.

Grave: PLEJ FRUŝA ALIĜO HELPOS NIN EN NIA LABORO.  
Petu informojn:

JEFO Sekretariato:  
S-ro.Dominique DESPINEY  
43, quai de Champagne  
F-94 - LE PERREUX

\$ \$ \$ \$ \$ \$ \$ \$ \$ \$ \$ \$ \$ \$ \$ \$ \$

K O T I Z O J

Ciuj kiuj ankoraŭ ne pagis la ĉi-jaran kotizon bonvolu sendi ĝin per Poŝtmandato,kiel eble plej baldaŭ al la afreso de la sekretariino:

M<sup>a</sup> JOSE MORAN  
C<sup>a</sup> Trauco, 9  
BILBAO-7-(Hispanio)

aŭ se vi preferas vi ricevos la proksiman numeron (75) per poŝta kontraŭpago.Ni memorigas ke niaj kotizoj estas: membroj HEJS-HEF malpli ol 25 jaroj: 100Ptoj.(ricevanta HEJS revuon kaj Boletín de HEF). Membroj de HEJS (ricevanta nur HEJS revuon) 50 Ptoj.

La ESTRARO

# TEJO - ARANĜOJ

Pro la unua fojo okazos prepara-seminario por kongresanoj: de la 16.- 18.6.72, en Hattingen/ F.R Germanio, kie i.a. temos pri-"vivo en Pollando hieraŭ kaj hodiaŭ", lumbildprelego, praktikaj informoj ktp; aldoniĝas ankaŭ da amusaĵoj kiel i.a. ga ja balo, kampofajro kaj kastelgasteja trinkado; ankoraŭ disponeblas kelkaj senpagaj aliĝoj. Intere suloj aliĝu de George D.Winkler, D-42 Oberhausen-11 Jaegerstr. 27 / F.R. GERMANIO.

\$& \$& \$& \$& \$& \$& \$& \$& \$& \$& \$& \$& \$&

28-a IJK de TEJO, 16-22.7.72, TORUN / POLLANDO

Ceftemo estos "Junularo kaj la Tria Mondo", krome SSRE en Toruń preparis seminariojn dediĉatan al Nikolao Kopernik, mondfama astronomo, kiu naskiĝis kaj vivis en Toruń; memkompreneble ankoraŭ okazos i.a. tradicia interkonatiĝa vespero, granda balo, in ternacia folkloro vespero, kampofajro en la kastelo kruskavaliera, tuttaga aŭtobusa ekskurso al lokoj ligitaj kun Kopernik, vizitado de Toruń kaj ŝipeks kurso sur Vistulo; aldoniĝas ebleco partopreni antaŭkongreson en Varsovio de 14 - 16.7. kaj postkongreson en Gdansk de 22 - 25.7.72;

kotizoj por IM de TEJO/UEA estas: ĝis 31.3= 29,\$ poste 34.-\$; antaŭkongreso: 15,-\$, postkongreso 17,-\$; kiu partoprenas ĉiujn tri aranĝojn krompas por ambaŭ aranĝoj 26.-\$ nur; aliĝoj nur akcepteblas ĝis 31.5.72; por aliĝintoj forfalos la deviga devizŝanĝo;

oni aliĝu al: S-ro Hans Bakker/ Amsterdam-Z, Kastelenstraat 231, NEDERLANDO; samtempe ĝirante la kotizojn je "Stichting voor internationale communicatie", (sama nomo K. adreso), pĉk NL-1975735;

GEORGE WINKLER

\$ \$



LA

ETERNA

TRAJNO



-Haltu la trajnon!.

-Halti ne povas!.

-Tiu trajno, kien iras ?.

-Tra la mondo, vojante, en serĉi de IDEALO

-Kiel ĝi nomas?.

-PROGRESO.

-Kiu iras ĉe ĝi?.

-La HOMARO.

-Kiu direktas ĝin ?.

-Dio mem !.

-Kiam haltos ?.

-Neniam !.

(Kaj ni pensas kiu ni povas aldoni: )

-Kiu ĝin subtenas ?.

-La INSTRUISTOJ.

Do ni difinas:

La INSTRUISTOJ estas kiel PILASTROJ kiuj subtenas la vojpontegon de la kulturo per kie pasas la trajnon de la progreso kiu, devenante de la malluma tunelo de la estinteco, sin enigis en la nekonato de la estonteco, savante la abismon de la nescio.

FILIASTROJ

(Manuel Alvarez López)